



Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Decembro : 4 2022

VICPREZIDANTO DE LA EŬROPUNIA PARLAMENTO ARESTITA PRO AKUZO PRI KORUPTADO

La prezidanto de la Eŭropunia Parlamento ĵus informis, ke la vicprezidanto estas senigita de siaj funkcioj en la Parlamento pro la suspekto, ke ŝi fraŭde ricevis monon ligitan al Kataro. Eva Kaili, vicprezidanto de la Parlamento, estas unu el la kvin homoj arestitaj kadre de polica enketo pri koruptado, krima organizado kaj mon-lavado en la Eŭropunia Parlamento.

Unuamomente la Socialista Grupo de la Parlamento, al kiu apartenas S-ino Kaili kiel greka deputito, decidis suspendi ŝin en ĉi tiu grupo. Krom S-ino Kaili, la belga polico arestis la eks-deputiton Pier Antonio Panzeri, ankaŭ la prezidanton de la Internacia Konfederacio de Sindikatoj, Luva Visentini kaj alian homon, kies nomo ne estas diskonigita.

Laŭ la polica esplorado, registaro de Kataro kontaktis kaj pagis al kelkaj homoj, kiuj influis favore al tiu emirlando per favoraj politikaj kaj ekonomiaj decidoj. Oni devas memori, ke Kataro ĵus organizis la Mondan Futbalan Ĉampionecon. La



decido organizi tiun sportan eventon en Kataro ricevis kritikojn el la tuta mondo, ankaŭ en Eŭropo, pro la fakto, ke estas konate, ke Kataro ne respektas homajn rajtojn kaj eĉ ne estas akceptataj tie samseksemaj rilatoj. Laŭ belga polico, la tasko de la arestita vicprezidanto kaj de aliaj influantaj homoj en la Eŭropunia Parlamento, estis agadi favore al Kataro ĉe la publika opinio en Eŭropa Unio.

Dum inspektado ĉe la hejmoj de la arestitoj, oni trovis kontantan monon kun entute 600.000 eŭroj. Eĉ en la hejmo de S-ro Panzeri, kiu estras asocion defendantan homajn rajtojn, polico trovis 500.000 eŭrojn. Prezidanto de la Eŭropunia Parlamento deklaris, ke tiu institucio kunlaboras senhezite kun la belga polico.

Vorto de la Semajno

Breveto:

Dokumento subskribita de suvereno, aŭ de ministro, donanta personan privilegion, ekz. nobelan titolon, oficiran gradon kaj simile.

Sinonimoj: *Diplomo, Patento.*

La reĝo nomumis la ambasadoron per brevelo reprezentanto ĉe la Internacia Kongreso.



Breveto aŭ diplomo

Jam estas tempo rekotizi por la jaro 2023

La jara kotizo de la asocio kostas:

- **7 eŭrojn** se vi loĝas en iama socialisma lando de Orienta Eŭropo, en Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), en Afriko aŭ en Latin-Ameriko.
- **14 eŭrojn**, se vi loĝas en alia lando.

Membro-studentoj pagas neniom.

Eblas pagi al UEA-konto ejax-r, se vi ne havas konton en UEA bv. kontakti kun la asocio por trovi alian manieron pagi la jaran kotizon.

Same, se kotizi kaŭzus al vi transpagajn aŭ ekonomiajn malfacilojn, bv. skribi pri tio al nia adreso:

jurista@esperanto.ac